

Eldonantaro:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa (Varsovio).
W. M. Page, advokato, Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, komercisto, Barcelona
H. Fischer, grandindustriisto, Bucuresti
Teo Jung, Horrem b. Köln
Frans Schoofs, Antwerpen (Anvers)
P. v. Medem, bank- kaj fabrikdirektoro, Kaunas.

Tarifa
vidu sur speciala folio, kiu estas aldonata al ĉiu specimena kaj unua numero de nova abono.

oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.
Tendenco: Neŭtrala - Tolerema - Esperantista - Internacia - Universala.
Aperas semajne. — Senpagaj aldonoj: „Internacia Komercio“ (praktika) kaj monata „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Administrejo:
(sulfita adreso)
Esperanto Triumfonta,
Horrem bel Köln, Germanio.
Redaktistaro:
Ĉefredaktisto: Teo Jung.
Kunredaktisto: M. Butin.
Literatura red.: Zanoni.
Kunlaborantoj
inter la Esperantistaro de la tutmondo.
Manuskriptojn oni skribu nur sur unu flanko de l' papero.
Tarifa
vidu sur speciala folio, kiu estas aldonata al ĉiu specimena kaj unua numero de nova abono.

Antwerpen-Anvers, Barcelona, Bucuresti, Edinburgh, Horrem b. Köln, Kaunas-Kowno, Paris, Warszawa

La limoj de Eŭropo.

(El „Paneuropa“.)

De D-ro Rikardo Nikolao Coudenhove-Kalergi.

1. Geografiaj limoj de Eŭropo.

Geografie ne ekzistas eŭropa kontinento. Ekzistas nur eŭropa duoninsulo de la eŭrazia kontinento. Ĉi tiu duoninsulo estas dispartigata per la Nigra kaj Baltika maroj. Norde de la eŭropa duoninsulo kuŝas la skandinava duoninsulo, la brita insulgrupo kaj Islando.

Kiel la okcidenta teritorio de l' eŭrazia kontinento estas nomata Eŭropo — tiel la sudorienta Hindujo. Hindujo estas samrate nomebla kontinento kiel Eŭropo, ĉar ĝi havas la saman nombron de loĝantaro kaj samgrandan teritorion; ĝi havas sian propran historion kaj sian propran kulturon, kiu ĝin precize diferencigas de l' cetera Azio. Fine estas la Himalaja-montaro natura geografia limo inter Hindujo kaj Azio — dume la Ural-montaro prezentas arbitran limon inter Eŭropo kaj Azio.

Hodiaŭ estas konsiderata kiel geografia limo de Eŭropo la maro — de Atlantiko al Mediteraneo unuflanke, al la Norda Glacia Maro aliflanke. Nur en oriento Eŭropo ne havas naturan limon, sed iom post iom ĝi transiras Azion. Nek montaro, nek riverego partigas Eŭropon de Azio. Pro tio la geografo — por geografe pravigi la ekziston de Eŭropo — sentis sin devigita rekonstrui kiel limon de Eŭropo la solan nordsudan, la eŭrazian profundebenajon transversantan montarencon: la Uralon, kvankam ĝi ne limigas la eŭropan duoninsulon, sed estas kuŝanta meze de la azia kontinento.

Uralo estis ankaŭ tial rekonstruita kiel limo de Eŭropo, ĉar ĝi estis deponita la lastaj du jarcentoj la politika limo de la rusa indigena lando.

La nomo Eŭropo originas el intermiksiĝo de geografiaj, politikaj kaj kulturaj elementoj. La norda-suda kaj okcidenta limoj de ĉi tiu terparto estis fiksita per la geografo, la orienta limo per la politiko. Pro tio aliĝis konstante la orienta limo de Eŭropo: de Rejno al Uralo, de l' Adriatiko al Kaspia Lago.

La geografia nomo Eŭropo nek estas identa kun la kultura, nek kun la politika nomo Eŭropo: laŭ kulturo Aŭstralio, laŭ geografia Granda Britujo estas parto de Eŭropo, dume politike ambaŭ kuŝas ekster Eŭropo kaj apartenas al la interkontinenta regno Britujo.

Oni devas severe diferencigi inter partigo de l' mondo en mondpartoj, regnoj kaj mond-kulturoj.

Geografie la enloĝebla mondo partigas en kvin kontinentojn: Eŭrazio, Afriko, Aŭstralio, Nordameriko, Sudameriko.

Politike la mondo partigas en la amerikan, orientazian, rusan kaj britan potencteritoriojn.

Kulturre la mondo partigas en la kvar kultursferojn: la eŭropa, ĥina, ĥinda kaj araba.

Ĉi tiu diferencigo devas esti firme tenata, por eviti fatalajn-miskomprenojn koncerne Eŭropon.

2. Historiaj limoj de Eŭropo.

„Hellas“ estis la unua Eŭropo. Ĝia kontrasto al Persio kreis la diferencigon inter Eŭropo kaj Azio. La limo de ĉi tiu Eŭropo estis la Mediteranea kaj Egea, la Marmara kaj Nigra Maroj, la Bosporuso kaj la Dardaneloj. Pri la formo de l' orienta limo de Eŭropo eĉ ne unu greko aŭ romano interesiĝis.

La duonhelena Aleksandro la Granda forigis la politikan limon inter Eŭropo kaj Azio kaj fondis la unuan eŭrazian regnon, kies kulturo estis la helenismo.

Romo kreis la duan Eŭropon. Ĉi tiu Eŭropo ampleksis la randŝtatojn de Mediteraneo; Rejno kaj Danubo estis la nordokcidentaj limoj de l' roma Eŭropo. Ĉi tiu limo kulture ĝis hodiaŭ ne malaperis.

La dispartigo de l' roma regno disigis la Balkanon de Eŭropo kaj lokigis la kulturcentron de l' regno en okcidentan Eŭropon. Orientromo fariĝis interregno inter Eŭropo kaj la Oriento: eŭrazia regno. Eŭropo fariĝis roma-katolika, Antaŭazio mahometana — dume Bizancio kaj Ruslando aliĝis al la greka-ortodoksa religio, restante dum jarcentoj sen decida influo sur la sorton de Eŭropo.

La popolmigrado kreis la trian Eŭropon. Fondiĝis germanaj regnoj sur la ruinoj de okcidenta Romo. Ĉi tiu germana Eŭropo, atinginta per Karolo la Granda sian plej altan rangon, limiĝis okcidente al la maŭra Hispanujo, oriente al la slavoj, avaroj kaj bizantianoj. Tiutempe Ebo estis la orienta limo de Eŭropo.

Post disŝalo de la karolida regno, iom post iom la papo transprenis la gvidadon de Eŭropo; tiel estiĝis la kvara Eŭropo, kies limoj akordiĝis al la disvastiĝo de la roma-katolika religio. Tiamaniere ĉi tiu kvara Eŭropo etendiĝis de oriento trans Litovio, Polujo kaj Hungarujo. Dum la krucmilitoj ĝi reprezentis politikan unuecon kontraŭ la mahometana Azio. Ĝi atingis sian plej altan rangon dum regado de Inocenco III-a, kiu havis ankaŭ la politikan superecon super la reĝoj de Eŭropo.

La papa Eŭropo disfalis definitive per la reformacio, disiginta Eŭropon en protestantan nordon kaj katolikan sudon.

La civilizacio, kies ideoj malantaŭenŝovis la konfesiajn interbatalojn, kreis la fundojn por kvina Eŭropo: por Eŭropo de civilizita absolutismo. Al ĉi tiu eŭropa ŝtatsistemo aliĝis sub Petro la Granda Ruslando, aparteninta dum sia mongola regnado al Azio. Tiel la Uralo fariĝis la orienta limo de Eŭropo, atinginta tiamaniere sian plej grandan amplekson.

La plej altan rangon de ĉi tiu kvina Eŭropo reprezentas Napoleono. Li restarigis kiel la lasta la eŭropan regnon de Julio Cesaro, Karolo la Granda kaj Inocenco III-a. Se li estus venkinta ĉe Leipzig, tiam jam ekzistus la Unuigita Ŝtatoj de Eŭropo, aŭ sub bonapartistaj aŭ sub respublikana reĝimo. Lia malvenko reĵetis Eŭropon en la internacian haoson. Sed la ideo de l' unuigita Eŭropo, kiun li renovigis, ne lasis sian plian mortigon. Ĝi vivadis plue en la reakcia kiel ankaŭ en la revolucia partioj, ĉe la reĝoj kiel ankaŭ en la popolo.

En la Sankta Alianco vivis la ideo de eŭropa solidareco, same kiel en la revolvo de Mazzini pri respublika, unueca Eŭropo. La interna politiko de l' pasinta jarcento estis okupata de bataloj inter la principoj de Metternich kaj Mazzini. La demokrata okcidento aliĝis al la ideo de Mazzini — la aŭtokrata oriento provis firme teni sin ĉe la ideoj de Metternich. La mondmilito alportis la decidon: Mazzini venkis kontraŭ Metternich, la tronoj en mez- kaj orienteŭropo faliĝis, la subpremataj nacioj akiris sian liberecon, Eŭropo fariĝis demokrata: per tio fariĝis libera la vojo al kreo de sesa Eŭropo: la Unuigita Ŝtatoj de Eŭropo, la Paneŭropa Federacio.

Kun ĉi tiu internpolitika akordiĝo de l' eŭropaj ŝtatoj koincidas la disĝo de Anglujo kaj Ruslando de Eŭropo. Dume la transformiĝo de Britujo en oceanan ligregnon metis la ekster-eŭropajn interesojn de Anglujo en la unuan vicon, dume Ruslando apartiĝis sin per proklamado de sovjetismo de la demokrata sistemo de Eŭropo. Ree forŝoviĝis la orienta limo de nia mondparto. Anstataŭ Uralo kaj Kaŭkazo estas la limo nun tiu, kiu partigas la sovjetsistemon de la eŭropa demokratio. Ĉi tiu limo estas proksimume la geografia bazo de l' eŭropa duoninsulo.

Uralo neniam plu estos limo inter Eŭropo kaj Azio. Estas eble, ke Ruslando iam denove unuigigos kun Eŭropo; sed tiam ne la Uralo — sed la Altaja montaro estos la limo inter Azio kaj Eŭropo, kaj Eŭropo limiĝos al la ĥina kaj japana reĝnoj kiel ankaŭ al la Atlantiko.

Estas ankaŭ eble, ke Ruslando disvastiĝos okcidenten por krei ekvilibron kun germanoj kaj okcident-slavoj kontraŭ la anglosaksaj-okcident-eŭropaj potencoj: tiam la eŭropa limo kuŝos,

kiel dum la roma epoko, ĉe Rejno kaj Alpoj, ĝis kiam ankaŭ ĉi tiu limo estos forigata de nova popolmigrado.

Hodiaŭ Eŭropo limiĝas nur sur la Balkano al Azio. Norde ree enŝoviĝis inter Azio kaj Eŭropo nova eŭrazia regno, disiganta Eŭropon de Azio, laŭ la sama selekta kaj bizanta regnoj.

Hodiaŭ la orienta limo de Eŭropo ree estas fiksita per la politiko; la sesa Eŭropo etendiĝas okcidente ĝis tien, kien la demokrata sistemo.

3. Eŭropa kulturo.

La eŭropa kulturo ampleksas ekster la geografiaj limoj de Eŭropo ankaŭ la tutan amerikan kontinenton, Aŭstralion, Sudafrikon kaj Nov-Zelandon. Krom tio troviĝas eŭropaj kulturo-oazoj en ĉiuj kolonioj.

La eŭropa kulturo estas la kulturo de l' blanka raso originanta sur la bazo de l' antikvo kaj de kristanismo. Pro tio la eŭropa kulturo estas ankaŭ nomebla la kristana, kontraŭe de la islama, budhista, ĥinda kaj konfucea kulturoj de Azio.

La ambaŭ polusoj de l' eŭropa kulturo estas la helena individualismo kaj la kristana socialismo.

La eŭropa kulturo estas laŭ sia esenco aktivisma kaj realisma: Ĝi klopodas energie realigi prudentajn celojn. Ĝia plej alta ago estas la scienco kaj ties praktika aplikado en tekniko, kemio kaj medicino. Laŭ tio ĝi superas ĉiujn ĝisnunajn kulturojn.

Al ĝia forta aktiveco, kiun ĝi havas per sia norda karaktero, dankas la eŭropa kulturo sian venkon sur la terĝlobo: ĉar, dum la ceteraj kulturoj estas en stato de perejo, la kulturo eŭropa venke antaŭenmarŝas. Al ĝi turnis sin la orienta regno Japanujo, dum Ĥinujo, Siĝamo, Afganistano, Persio, Turkujo kaj Egiptio sekvas ĝian ekzemplon. Verŝajne la kulturo eŭropa absorbos post unu jarcento ĉiujn aliajn.

La kristana-eŭropa kulturo partigas en diversajn nuancojn, en kiuj estas konstateblaj eventualaj ĝermoj de novaj kulturfarmoj.

Tia nuanco de eŭropa kulturo estas la amerikana. Ĝi estas la ekstrema kontrasto de ĉiujn orientalismo, de ĉiu meditemo kaj mistikismo. Ĝi estas optimista, celkonscia, agadforta kaj progresema. Ĉi tiu amerikano cetero ne estas limigita al Ameriko, sed ĝi regas ankaŭ la industriajn centrojn de l' malnova mondo (Berlino).

Alla nuanco de eŭropa kulturo ŝajnas esti la rusa. Kelkio atestas, ke Rusujo estas elreĝo de nova kulturo, kiu kunligos eŭropan kaj azian elementojn al nova sintezo.

MALRIĈA EN SPIRITO.

Teatraĵo en du aktoj kaj unu interakto.
Originale verkita de H. J. Bulthuis, L. K.

(2-a Daŭrigo.)

Alberto. Kiel li fartis dum la lastaj tagoj? Patrino. Lia sano estas bona, sed lia spirito ne pliboniĝis. Lia memoro kelkfoje estas tre malforta. Li memoras ordinaro nur tion, kio interesas lin; la ceteron nur, se oni helpas al li; kaj li komprenas nur malrapide kaj nur, se oni parolas al li per mallongaj frazoj. Nun sidigu! Mi brogos kafon aŭ boligos lakton, tio varmigos vin post tia promeno en la malbona vetero. Ĉu vi deziras manĝi? Atendu, mi havas ankoraŭ —

Alberto (kun rifuza gesto). Ne, patrino! Mi nek trinkos nek manĝos. Mi venis nur por — por adiaŭdiri —

Patrino (surprizite). Por adiaŭdiri? Vi do ne venis permeso?

Alberto. Ne. — Jes. — Mi ankaŭ venis permeso, nur kelkajn horojn —

Patrino. Nur kelkajn horojn?

Alberto (post momento). Jes, nur du —

Patrino (malkvietiĝas). Nur du? Sed tio estas terura!

Alberto. Jes, patrino, tio estas tre terura!

Patrino. Kaj kiam vi revenos?

Alberto (levas la ŝultrojn, sed ne repondas).

Patrino. Vi ne scias tion? (Kun timo.) Vi do kuniros — Rusujon?

Alberto (hezitante). Rusujon? — Ne — jes — mi kuniros tien.

Patrino. Sed, Alberto, kiel strangaj kaj evitemaj estas viaj respondoj! Mi ja tute ne komprenas vin.

Alberto (levas la ŝultrojn, sed ne respondas).

Patrino (maltrankviliĝas pli kaj pli). Sed diru do — ĉu okazis io — stranga? — io?

Alberto. Ho, patrino! Io terura okazis.

Patrino (terurite). Io terura? Ĉu la milito eksplodis — kontraŭ Rusujo?

Alberto. La milito eksplodis jam antaŭ iom da tempo, tion vi ja scias. Mi ne intencis paroli pri la milito. (Fingre montras Johanon.) Ĉu li dormas?

Patrino. Jes, li dormas. — Sed kio do okazis? Io pli terura ol — ol tiu milito?

Alberto (kapjesas, sed ne respondas).

Patrino. Sed parolu do pli klare! Kio okazis?

Alberto. Mi ne venis por diri tion al vi, patrino; sed mi ja ne povas pli kaŝi la veron.

Ho, ĉiopova Dio! (Metas la brakojn sur la tablon kaj, kaŝante la vizaĝon inter ili, plorsingultas.)

Patrino (leviĝas, iras al li, metas la manojn sur lian kapon). Sed, en la nomo de Dio, Alberto! Parolu do! Vi maltrankviliĝas min.

Alberto. Ho ve, patrino, mi ne povas — mi ne kuragas.

Patrino. Ĉu ĝi estas tiel terura?

Alberto (eksidis rekte). Sidigu, patrino, kaj mi ĝin rakontos.

Patrino (eksidis kontraŭ li ĉe la tablo). Ho Dio! Kio do pendas super mia kapo!

Alberto (post momento). Post kiam mia patro mortis, Johano kaj mi devis labori por vi, kaj la ĉielo estas mia atestanto, ke estis al mi ĝuo tion fari. — Sed post la katastrofo, kiu faris Johanon simplulo, mi sola devis preni sur min tiun taskon, kaj mi estas sana kaj juna, kaj mi ŝatas labori. — Poste oni serĉis rekrutojn, mi devis loji kaj fariĝis rekruto. Tio estis la dua

katastrofo, ĉar de post tiu momento vi sola devis labori por vi kaj por Johano; ĉar kvankam li plektas korbojn, li perlaboras per tio tiel multe, ke preskaŭ ne valoras la penon paroli pri ĝi. — Ĉiam mi esperis baldaŭ reveni hejmen por denove helpi kaj subteni vin. Sed la tria katastrofo venis: la milito kontraŭ Rusujo. Anstataŭ baldaŭ rehelmiĝi, mi devis marŝi kun la granda armeo, ĉar nur malmultaj restos tie ĉi. Mi ne bezonas diri, kiel tio malesperigis min, ĉar kia estas la sorto de vi kaj Johano, se mi neniam revenus —, kaj la ĉielo scias, kiom malmultaj revenos —, Rusujo estas tiel vasta — kaj tiel malproksima. Miloj da soldatoj falis jam sur la batalkampoj, kaj pereos ankoraŭ centoj da aliaj miloj, ĉar la milito ne finiĝos tiel longe, kiel vivos la imperiestro. Sed ĉiuj tiuj perantaj soldatoj ne kortuŝas la imperiestron. Li ĉiam kaj ĉiam bezonas novajn milojn. — Mi ne estas malkuraĝulo, sed kiel oferi mian vivon por aferoj, kiuj interesas nur la imperiestron kaj ne nin? Se la patrujo estas en danĝero, kiel antaŭ kelkaj jaroj, sen kontraŭdiro, eĉ sen murmuroj mi partoprenus por defendi ĝin kontraŭ atakantaj malamikoj. Sed nun la afero estas tute alia, nun mi mem estos inter la atakantoj. Longe mi meditis pri tio, kion fari; fine mi decidis forkuri, tiamaniere mi ja havis la ŝancon poste reveni kaj labori por vi —, aŭ vi kaj Johano povus sekvi min en la fremdan landon, kaj tie ni povus kune vivi feliĉe kaj pace. Kaj mi forkuris, sed mi estis kaptata kaj jetata en la arestejon. Tie mi pasigis du terurajn semajnojn, ne pro mi mem, sed pro vi kaj li (fingre montrante Johanon). Hieraŭ la milita konsilantaro juĝis min — kaj kondamnis min — (atendas momenton).

Patrino. Kondamnis? Al kio?

Alberto. Al la moripuno —

Patrino (volas ekstarti, eligas laŭtan krihon svenas kaj glitfalas de la seĝo).

Johano (vekiga, rigardas kun miro siajn patrinon kaj fraton, sed restas sidanta senmove, aŭskultante kun streĉita atento).

Alberto (residiĝas la patrinon sur ŝian seĝon, kie ŝi malrapide rekonsciiĝas). Trankviliĝu, patrino, vi vekos Johanon!

Patrino. Al mortpuno! Ho Dio, jen la kvara katastrofo! (Subite.) Sed kiel vi povis veni ĉi tien post tiu kondamno? Vi ja estas libera! Forkuru tu, aŭ — kaŝu vin — tion vi ja povas!

Alberto. Jes —

Patrino. Rapidu! Eble mi povas kaŝi vin — sur la mansardo, sub la pajlo. Vi ja estas libera!

Alberto. Jes, patrino, mi estas libera.

Patrino. Nu do!

Alberto. Nun mi estas libera; sed mi devas iri returne post unu horo kaj duono, ĉar morgaŭ jam frue en la mateno — je la sesa horo —

Patrino. Je la sesa —?

Alberto. — ĝi okazos.

Patrino. Kio?

Alberto. La kvara katastrofo.

Patrino. Tiufore ili mortpafos vin?

Alberto. Jes, patrino.

Patrino (vivege). Sed tio ne okazos, tio ne fariĝos! Vi ja estas libera, vi ja povas forkuri kaj savi vin!

Alberto. Tion mi povas, sed tion mi tamen ne povas, patrino.

Patrino. Sed kial vi ne povas?

Alberto. Pripensu, ke mi estas tie ĉi kun permeso! Sed je la tria horo mi devas montri min en la kazino.

Laŭ raso, Ruslando estas miksaĵo de eŭropaj kaj mongolaj (tataraj kaj finnaj) elementoj. Depost la popolmigrado ĝi apartenas politike kaj kulture alterne al Eŭropo kaj Azio. Ĝia lasta azia epoko, la tatarregno, daŭris de 1200 ĝis 1498, ĉi tiu epoko apartenas nur de 200 jaroj politike al Eŭropo. En tiu tempo ĝi surpris eksteraj eŭropajn kulturformojn, ne ŝanĝante sin en sia esenco.

La bolŝevismo detris la eŭropan civilizacion importitan de Petro la Granda kaj liaj posteuloj. Ĝi forpelas aŭ mortigas la plej multajn reprezentantojn de ĉi tiu civilizacio. Ĝi deturnas sin de la kristana kaj demokrata Eŭropo kaj provas krei per eŭropaj teorioj kaj aziaj praktikoj la fundon de nova rusa kulturo.

Ĉu ĉi tiu kultura emancipiĝo de Eŭropo sukcesos, tio estas afero de atendo. Ĉar povos okazi, ke post paŭzato Ruslando daŭrigos sian interrompitan eŭropigon kaj disvastigos la eŭropan kulturteritorion ĝis la Atlantiko.

Ĝis kiam la kultura stato de Ruslando estos malcerta, ĝis kiam la orienta politika limo inter Eŭropo kaj Ruslando estos ankoraŭ la orienta limo de la eŭropa kulturkomuneco.

Ruslando kaj Japanujo estas la du eksponentoj de eŭraziaj kulturoj, kiuj eble iam sukcesos atingi sintezon sur pli alta rango.

Esperantigis D-ro Sds (Wien).

(El la verko „Panetropa“ de juna eminenta sociologo kaj filozofo, kies ideoj jam ĝis nun vekis ofte la atenton de la inteligenta publiko).

IREKO.

Alveturo. Koblenz kiel krucpunkto de gravaj fervojaj linioj Metz-Giessen-Berlin kaj Köln-Mainz-Frankfurt) estas facile atingebla de ĉiuj direktoj. Per rapida vagonaro oni veturas de Kolonjo (Köln) ĝis Koblenz ĉ. 1 1/2 horojn, de Trier 2 h., de Giessen proks. 3 h. Por la alveturo oni povas uzi ankoraŭ la vaporŝipojn sur la Rejno kaj la Moselo (de Trier). Detalajn informojn laŭ peto (respondpago!).

Aligoj. Alvenis la unuaj aligoj al la Internacia Rejna Karavano, inter ili eĉ el sudaj landoj. Tamen la ankoraŭ negranda nombro de allandaj partoprenantoj igitas nin doni tiujn informojn: La stato en la Rejna provinco bedaŭrinde ankoraŭ ne klarigis. Tamen, eĉ se pliboniĝo ĝis la fino de julio ne okazus, nia alkonkreska karavano ne estos malhepata kaj certe povos esti. Ĉi tiu firma konvinko ĝis nun gvidis la aranĝantojn, kiuj neniel lasis sin influ per iom nefavoraj cirkonstancoj. Kaj ili ne ĉesigos la entreprenon. Alie ili tenos la verdan standardon, meze de ĉiuj naciaj konfliktoj. Nur ni bezonas la helpon de niaj samideanoj per vere multnombra partopreni! — La partoprenajn kartojn ni sendos al la aligitaj allandanoj post 2—3 semajnoj. — Dezirojn pri loĝigo ni plej akurate plenumos. — Ni atentigas pri nia antaŭa publikaĵo en ET n-o 129. — Adreso por ĉiuj sendaĵoj: Esperanto-Grupo, Florinsmarkt 7a1, Koblenz, Germanujo. Represo petata.

Alrapidu tutmondanoj

al la bela Rejna bord'! — Kiom ofte oni aŭdis pli frue ĉi tiun kanton sur la bordoj kaj ŝipoj de la Rejno. Kaj ne vana estis la voko. Ili al-migris, ankoraŭ nun almigras ĉiujare denove el landoj proksimaj kaj malproksimaj, por rigardadi la belajn kaj ĝul la belecojn de tiu malluna majesta riverego. Kiu ajn povas ebligi, tiu ne volas lasi, almenaŭ unu fojon dum sia vivo viziti la plej faman regionon de la Germana Regno, kie loĝas popolo konata en la mondo pro siaj gastamo kaj gajeco. — Plej multe allogas la fremdulojn la pejzaĝaj belecoj. Kiel verdargenta rubando la larĝa rivero en sunbrilo longetendiĝas tra la lando. Brilluraj urboj kun katedraloj kaj preĝejoj respeguliĝas en la ondoj.

Patrino. Kaj se vi malestos? Alberto. Mia honoro kaj mia konscienco malpermesas al mi iri ne returne.

Patrino. Sed, kara knabo, pensu do pri mi — pensu pri via fratino!

Alberto. Tion mi faris; sed antaŭ ĉio mi devas pensi pri Huberto.

Patrino. Huberto? Alberto. Jes, pri Huberto, la malluna serĝento, kiu riskis sian propran vivon — nur, por ke mi lastfoje povu iri hejmen por adiaŭdiri vin —

Patrino (rigardas Alberton, sed ne komprenas lin).

Alberto. Huberto estas mia plej kara amiko, kvankam li estas mia superulo. Ni mortus unu por la alia, se estus necese — kaj se estus eble. Li okaze estas tiu, kiu kondukis min en la areŝton, kaj li preskaŭ malesperis pro tio; sed li devas plenumi siajn instrukciojn kiel soldato kaj kiel mia gardanto. Li ne povas alligi la aferon nek malebligi la katastrofon. Li povis kaj kuraĝis nur kaŝe permesi al mi iri hejmen, por ke mi adiaŭdiru vin lastfoje. Sed je la tria horo mi devas refoje esti en mia areŝto.

Patrino. Kaj se vi ne estos tie? Alberto. Tiokaze mian amikon trafos tiu kvara katastrofo, ĉar li estas respondanta pri miaj faroj; li, kiel mia gardanto, devas zorgi pri tio, ke mi ne forkuru.

Patrino (plorante). Ho Dio, kompatu!

Alberto. Dio ne povas kompati tie ĉi, patrino; tion povas nur la imperiestro.

Patrino. La imperiestro? Mi iros al li; mi petegos lin surgenue. Li ja kompatis min kiel patrino.

Alberto. Estas tro malfrue, kaj tute superflua peno. La imperiestro neniam kompatis en tiaj aferoj.

Afablaj vilaĝoj salutas el pentrindaj valanguloj. Kaj de la vito- kaj arboritaj montoj minacas la ruinoj de kasteloj, memorigante pri delonge pasintaj tempoj. Sur la rivero tamen, borderita ambaŭflanke per fervojoj, oni rigardas la akiraĵojn de nia tempo. Agemaj trenŝipoj, pelitaj per ŝovelradoj aŭ peŝraŭbegoj, ŝiras post si tutan ĉenon da ŝarĝobatoj, plejparte enhavantaj karbon el la Ruhr-regiono. Helkolorigitaj facilmovaj personŝipoj fiere preterveturas. Jen kaj jen remboatoj balanciĝas sur la akvo, kaj iufoje velboato kun blankaj veltukoj rapidglitas sur la ondoj. Sur la bonegaj, larĝaj bordoseoj rapidas aŭtomobiloj, apude elektraj tramoj kaj fervojaj vagonaroj. Sur pontoj majeste arkigantaj ili transiĝas la riveron. — Kulturo kaj naturo intime kaj harmonie kunligitaj — jen la ĉefa karaktero de la Rejno kaj ĝia lando!

Leono Funken.

Pofesoro Bovet en Rumanujo.

Je la invito de Esperanto Centro Rumana, Prof. Pierre Bovet, direktoro de la Instituto J. J. Rousseau en Genève, bone konata jam al la Esperantistaro kiel kunvokinto kaj prezidinto de la pasintjara internacia konferenco en Genève pri Esp. en la lernejoj, en la dua semajno de aprilo, partopreninte la konferencon en Venezia pri komuna komerca lingvo, vizitis la rumanan ĉefurbon Bucureŝti, kie li faris, du grandefikajn paroladojn. La unua temis pri „la moderna edukado kaj la Instituto J. J. Rousseau“, la dua pri „la eksperimenta edukado kaj Esperanto en la lernejoj“. Ambaŭ paroladojn ĉeestis multnombra publiko, inter kiu pluraj eminentuloj de la rumandana instruado, ekzemple Prof. Mehedinti, estinta ministro de la Publ. Instruado. La klarigoj de Prof. Bovet pri Esperanto tiom efikis, ke post la paroladoj multaj personoj — eĉ el la plej superaj sociaj rondoj — esprimis la deziron por kurso, kaj la publika opinio, kune kun tiu de la plej gravaj edukistaj rondoj, multe favorigis por nia movado.



Meze: Prof. Bovet.

Maldekstre: s-o Henriko Fischer, L. K. ano, direktanto de Esp. Centro Rumana, kuneldonanto de ET. Dekstre: Pastro Andreo Ĉe, sekretario de Esp. Centro Rumana.

domo ovacis la traveturantan scenculon mondfaman, sindonan amikon de la mondlingva movado. La Esperantistaro de Rumanujo perlene publike dankas la honorindan profesoron pro lia oferema decido entrepreni vojaĝon tiel longan kaj malfacilan, kaj speciale ankoraŭ pro la altvalora subteno kaj helpo donitaj al nia movado, kies baldaŭaj progresoj estu konsiderataj kiel rezultato de lia vizito, farinta profundajn efikojn.

E. G. R.

Kongreskaravano Berlin-Nürnberg.

La estraro de la Esp. gruparo Berlin decidis, aranĝi kongreskaravanojn per speciala trajno de Berlin al Nürnberg. La subskribinto estas komisiita, efektiviĝi tiun aferon. Intertempe mi interrilatis kun la regna fervoj-direkcio en Berlin kaj ekscias la kondiĉojn, kiuj estas plenumotaj por la nomita celo. La ĉefkondiĉo estas jena: La nombro de la partoprenantoj devas esti minimume 400. La trajno konsistos nur el vagonoj de 3-a klaso. La prezo do estos la sama por ĉiu. La alieco de la prezo, kia ĝi estos en aŭgusto, ne jam povas esti fiksata. Ĝi estos publikigata ĝustatempe antaŭe. Antaŭpago estos nepre necesa.

Por ekscii, ĉu la postulata nombro de kunvojaĝantoj estas atingebla, mi petas la ge-kongresanojn, kiuj certe veturos per la speciala trajno, sciiĝi min pri tio per simpla poŝtkarto, ne aldonante aliajn komunikojn, nur skribante tre

Patrino. Sed tio estas monstra! (Tordante la manojn pro malespero.) Ho, kion fari?

Alberto. Adiaŭdiri min, patrino, por la lasta fojo.

Patrino. Kaj poste vi reiros tien por esti mortpafata? Ho, estas tro terure — Ĉu Dio neniam indulgos min? Ĉu ankoraŭ nun li ne helpos?!

Alberto. En militaj aferoj la imperiestro ŝajnas esti pli potenco ol la Ĉiopoza mem.

(Mallonga paŭzo. Johano, kiu ĝis tiuj lastaj vortoj aŭskultis kun larĝe malfermitaj okuloj, refoje fermas la okulojn kaj restas sidanta sen movo.)

Patrino. Ĉu tiu serĝento jam havas la saman aĝon kiel vi? Ĉu li havas patrinojn kaj duone idiotan knabon por prizorgi kiel vi?

Alberto. Li estas jam sesdekjara, mi supozas. Familon, kiom mi scias, li tute ne havas. Sed ĉio tio alligas nek la situacion nek la aferon. Li devas plenumi siajn instrukciojn, jam li malatentis ilin por mi. Se tiam oni ekscios, li estos punata kiel helpinto de forkuranto. Koncerne min, mi devas obei mian honoron. Mi promesis, mi juris reveni, kaj mi reiros al la kazerno. — Restas al mi ankoraŭ unu horo por preparoli kun vi kelkajn aferojn — kaj poste mi devos foriri por neniam revidi vin kaj lin. (Li fingre montras Johanon, plorsingultas, metas la brakojn sur la tablon, kaŝas la vizaĝon inter ili, dum lia korpo skuigatas pro emocio.)

(Daŭrigota.)

Al sendintoj de alvokoj.

Lastatempe ni ricevis multajn alvokojn pri senpaga alsendo de Esp. gazetoj, libroj, afiŝoj, korespondadoj ktp. por biblioteko aŭ ekspozicio. Tiajn alvokojn ni povas publikigi nur kontraŭ pago.

legeble la nomon, adreson kaj kongresnumeron. Laŭ tio mi volas starigi nomaron. La veturado de Berlin al Nürnberg daŭros 10 horojn.

Max Blankenheim
estraro de la Esp. Gruparo Berlin
Berlin-Steglitz (Germanlando),
Stubenrauchplatz 5.

Mallongaj Esp. Sciligoj.

Aŭstrio.

En la komerciernejo en Mödling apud Wien s-o H. Isler de Almbach aranĝis paroladon pri la granda valoro de Esp. La direktoro s-o E. Arends disponigis grandan klasojn, kie nun okazas kurso kun 25 gemanantoj 15—20-jaraj. Graz. La 13.4. en la nova hejmo de la loka grupo okazis bone vizitita Zamenhof-vespero. La grupestro s-o Hallmayer faris paroladon pri Esperantismo, s-o Wallner deklamis monologon el Hamleto kaj s-o Bartel raportis pri la Konferenco de Venezia. — De nun la kunvenoj okazos ĉiuvendrede je 18.30 h. en „Staatsbeamtenkasino“, Albrecht-

La Esperantistoj de Bucureŝti kaj la iamaj rumanaĝelernantoj de Prof. Bovet — nun en altaj pozicioj — ame festis la ŝatatan gaston ĝis la adiaŭo ĉe la Norda Stacidomo, kien lin akompanis krom aro da samideanoj ankaŭ eminentaj reprezentantoj de la rumana instruado, inter ili s-o Valeriu, ĝenerala subdirektoro de la supera instruado, s-o E. Botez, ĝenerala direktoro de la Ministerio por Socia Helpe, kaj s-ino Isabella Sadoveanu, direktorino de la Normala Lernejo por knabinoj (edukejo de instruistinoj kun 600 studentinoj, unu el la plej grandaj kaj gravaj institucioj de la lando).

La Esperantistoj de Cluj ĉe la stacidomo ovacis la traveturantan scenculon mondfaman, sindonan amikon de la mondlingva movado. La Esperantistaro de Rumanujo perlene publike dankas la honorindan profesoron pro lia oferema decido entrepreni vojaĝon tiel longan kaj malfacilan, kaj speciale ankoraŭ pro la altvalora subteno kaj helpo donitaj al nia movado, kies baldaŭaj progresoj estu konsiderataj kiel rezultato de lia vizito, farinta profundajn efikojn.

E. G. R.

gasse 3 (Lesezimmer). — Por la Dekkvina anoncis sin ĝis nun 40 grupanoj. —

Post kelkaj paroladoj kaj multaj penigaj antaŭlaboroj urboficisto Rudolf Michael Frey povis komenci sabaton, la 7. aprilo en la instituto „Johanneum“ de la katolikaj „Lernejo-Fratoj“ (Schulbrüder) en Wien, III-a distrikto, Erdbergerstr. 43, grandan kurson kun preskaŭ 70 partoprenantoj, inter ili la direktoro, vicdirektoro kaj 3 instruistoj de la instituto, plue la tre fervora registara konsilisto Hans Pawlowsky, la ĉefo de la grava polica inspektorejo en la Orient-ĉefstacidomo, kiu aldone mem (!) gvidos kurson por siaj policanoj kaj ĝendarmoj; krome partoprenas financ-konsilisto Dr. Anton Walker, multaj oficistinoj ktp. S-o F. ankaŭ fondis „laborkomitaton“ (gvidanto la supre menciita reg. kons. Pawlowsky), kiu prizorgos la vigan ekfloron de ĉi tiu nova grupo de „Katolika Unuigo Esperantista en Wien“ en la orienta parto de Wien kaj per tio ankaŭ subtenos la ĝeneralan Esp. movadon kune kun la multaj aliaj Esp. unuigoj kaj grupoj en Wien, por ke ni wienanoj povu inde saluti la XVI-an (1924) en Wien.

S-o F. ankaŭ gvidas t. n. „Akademikerkurs“ (por kleruloj) en la iama „Reichskriegsministerium“, I-a distrikto, Stubenring, la nuna ejo por la ministerioj por soldataj kaj komunikaĵaj aferoj. Partoprenas i. a. la fervoraj s-o ministeria konsilisto Hugo Paul, sekcia konsilisto Richard Kraft, poŝtsekretarioj de la poŝtdirekto Dr. Zwölfer kaj Mörtherberger.

La Federacia Komisario. Adreso: B. Orenge. Via Manzoni 3. La Spezia (Italio).

Por la Zamenhof-monumento

ni ricevis de Esp. Grupo Essen 5000 gmk. Instigo por sekvontaj.

Por „Esperanta Ligilo“

ni ricevis: 245. F-ino L. H. 50000 pol. mk.

Scienco.

Temperaturo ĝis 20000° en laboratorio.

La amerikaj fizikistoj L. Wendt kaj C. E. Irlion sukcesis (laŭ „Kosmos“, januaro 1923) atingi dum siaj Eksperimentoj temperaturojn ĝis 20000° C., havante la eblecon observi procedojn de plej granda scienca signifo.

La plej altaj temperaturoj, ĝis nun atingitaj kaj aplikataj dum laboratorioj laboroj, estis tiuj de elektra lumarko (3000—4000°). Ankoraŭ pli alta grado de varmeo — ĝis 10000° — estis atingata per la elektra deŝarĝo.

Sed jam antaŭ kelkaj jaroj J. A. Andersen klarigis la procedon, kiu permesas atingi ankoraŭ pli altajn temperaturojn.

Ĝi konsistas el ŝarĝo de grandamplaksa kondensilo ĝis la tensio (streĉo) de kelkcent miloj da voltaj kaj ĝia deŝarĝo tra maldika drato. La lasta momente varmegiĝas, degelas, eĉ vaporigigas kaj eksplodas. La vitra tubo dispeciĝas. La tuta procedo daŭras nur 1/300000 da sekundo.

La apostolo en danĝero.

De Ivan Vazov.

Okaze de la 50-jareco de la pendigo (29. febr. 1875) de Vasil Levski, kiun la bulgara popolo funebre festis antaŭ nelonge. Vasil Ivanov, poste nomita Levski (La Leono) estas naskita en Karlovo la 6. (19) junio 1837. Li estas unu el la plej lumaj kaj kuraĝaj pioniroj de la bulgara libereco, fantomo, legendo por la turka registaro tiama. Lia nomo, liaj ideoj kaj lia revolucia agado meze de la populamasoj dum tutaj dekonoj jaroj donas al ni enhavon de tiu epika batalo, kiu altrudis la liberigon de la bulgara popolo el la fremda politika sklaveco. — I. H. Kr.

Hodiaŭ la bela reĝa palaco troviĝas sur la sama loko, kie en la jaro 1871 staris la malnova »valia konako«) kun siaj malbelaj kaj nekomfortaj konstruaĵoj, havantaj je la flanko de la mallarĝa kaj pavimita korto subtegmento-koridorojn duone ruiniĝintajn; okcidente estis granda ligna pordo, gardata de du policistoj; maldekstre de ĝi elstaris moskeo, kaj dekstre verdirigis granda saliko kun pendantaj ĝistere branĉoj, kiu sola ĝojigis la rigardon en tiu loko.

En bela junia tago, la saman jaron, tra la pordo de la konako eliris amase policistoj, haliis sur la placeto, interkonsilis iom kaj disiris laŭ diversaj direktoj.

Unu el ili, la konata Ali-Ĉauŝ — brunega, barbula turko, kun vizaĝo maldelikata kaj ŝvelinta, iris al la bazaro (hodiaŭ la „Strato de Komerc“), faris al si vojon tra la amasa pasantaro, kiu svarmis en la mallarĝa strato, ĝenata ambaŭflanke de malaltaj butikoj kaj magazenoj, atente flskante la rigardon al ĉiuj personoj. Kiam li

) Turka polico.

Britujo.

La 29.4. en la oficejo de la laborista partio en Croydon okazis interesa kunveno. S-o Spiller parolis pri la utileco de Esp. por la laboristaro. F-ino el la Croydona grupo instruas Esperanton al infanoj de laboristoj ĉiudimanche, kaj oni proponis fondi apartan lab. grupon por studi Esperanton. La Croydona Esp. Societo kunvenas la unuan kaj trian mardon en ĉiu monato.

La ĉiujara kunveno (kongreso) de la Brita Esp. Asocio okazos en Bournemouth dum Pentekosto (18—22. majo).

Estonio.

La jarkunveno de Esp. Asocio de Estonio okazis la 18.4. en Tallinn (Reval). Laŭ sciigo de la prezidanto la Asocio, post apenaŭ unu jaro de agado, jam kalkulas 409 anojn. Plej bone funkcias la grupoj de Tallinn, Narva, Valk kaj Haapsalu.

Litovujo.

Panevežys. — En loka gimnazio fondiĝis Esp. Grupo, al kiu aliĝis jam 62 ge-gimnazianoj. Estas aranĝita por ili Esp. kurso, kiun gvidas gimnaziano Lauzikas.

Esperanto radiata en Ruslando.

Trian fojon radiotelefono portis al la mondo Esperantan parolon. Trian fojon Esperanto pravas praktike sian neceson en radiotelefono. Unuan fojon la voĉo venis el Ameriko, duan fojon el Britujo, nunel la vasta Sovetlando. La 25-an de aprilo je 5.50 h. vespere s-o E. K. Drezen faris per radiotelefono paroladon Esperantlingvan: „Ĉu la proletario bezonas internacian lingvon?“ Kaj respondis estis: „En luktado kontraŭ kapitalismo al proletarioj el ĉiuj landoj por unuigo necesas internacia lingvo.“ La lekcio okazis en Moskva kaj estis bone aŭdata ĉe la radio-stacio de Petrograda Elektroteknika Instituto kaj ĉe la granda stacio en „Deŝkoje Selo“ apud Petrograd. G. N. Teterin, Petrograd.

Esperanto ĉe blinduloj en Usono.

Dr. D. O. S. Lowell instruas klasojn de 20 blinduloj en Perkins Institution for the Blind, Watertown, ŝtato Massachusetts, komence de 17.4. — S-o Joseph Bartlett (blindulo) kaj unu el tri blindaj junuloj de Perkins Institution, kiuj vizitis la Esp. kongreson en Cambridge, instruas Esperanton en oficiala kurso de Antioch College, urbo Yellow Springs, ŝtato Ohio, kiu komencis en aprilo.

Peresperanta Itala Komisarofico por Militperditoj. Alvoko al rusaj, siberiaj, orientaj samideanoj.

Per ĉi tiu Ofico, Itala Esperantista Federacio zorgas serĉadojn kaj kolekton de informoj pri italaj (kaj neitalaj) militkaptitoj, kiuj ankoraŭ vivas mizerige en Ruslando, Siberio, Kaŭkazo ktp., sen ebleco reheimiĝi kaj eĉ komuniki kun sia naskiĝlando. Pri ilia ekzisto ofte parolis italaj gazetoj kaj iuj reheimiĝintoj.

Oni petas ĉiun samideanon, kiu ion aŭdis pri tiu ĉi afero, respondi jenajn demandojn:

1. Ĉu ankoraŭ ekzistas en Ruslando, Siberio, Kaŭkazo kaj en aliaj orientaj landoj eksmilitkaptitoj, sen ebleco regule komuniki kun sia hejmlando?

2. Kia estas ilia deveno, nuntempa restado, kaj la vivkondiĉoj?

3. Kiajn informojn oni povas doni pri ili?

4. Kiel oni povus senpere komuniki kun iu el ili?

La komisarofico petas helpon por doni helpon: ĝi fidase sentoj de Esperanta frateco, kaj samideane dankas jam nun ĉiun respondantojn.

La Federacia Komisario. Adreso: B. Orenge. Via Manzoni 3. La Spezia (Italio).

Por la Zamenhof-monumento

ni ricevis de Esp. Grupo Essen 5000 gmk. Instigo por sekvontaj.

Por „Esperanta Ligilo“

ni ricevis: 245. F-ino L. H. 50000 pol. mk.

Scienco.

Temperaturo ĝis 20000° en laboratorio.

La amerikaj fizikistoj L. Wendt kaj C. E. Irlion sukcesis (laŭ „Kosmos“, januaro 1923) atingi dum siaj Eksperimentoj temperaturojn ĝis 20000° C., havante la eblecon observi procedojn de plej granda scienca signifo.

La plej altaj temperaturoj, ĝis nun atingitaj kaj aplikataj dum laboratorioj laboroj, estis tiuj de elektra lumarko (3000—4000°). Ankoraŭ pli alta grado de varmeo — ĝis 10000° — estis atingata per la elektra deŝarĝo.

Sed jam antaŭ kelkaj jaroj J. A. Andersen klarigis la procedon, kiu permesas atingi ankoraŭ pli altajn temperaturojn.

Ĝi konsistas el ŝarĝo de grandamplaksa kondensilo ĝis la tensio (streĉo) de kelkcent miloj da voltaj kaj ĝia deŝarĝo tra maldika drato. La lasta momente varmegiĝas, degelas, eĉ vaporigigas kaj eksplodas. La vitra tubo dispeciĝas. La tuta procedo daŭras nur 1/300000 da sekundo.

atingis la hotelon de Trajkoviĉ, li jetis explore rigardon al ĝi kaj al ĝia drinkejoj, tuŝis aŭtomate sian revolveron, kvazaŭ por certigi, ĉu ĝi estas en siaingo, kaj ekiris al la hotelo.

En la sama momento li vidis policiston ventantan al li. Ali-Ĉauŝ haliis ĉe la pordo de la hotelo kaj atendis lin.

„Kion vi eksciis?“ demandis li mallaŭte.

„Mi traserĉis, sed tian ne trovis,“ respondis la policisto, viŝante per tuko sian razitan ŝvitantan kolon.

„Ĉu vi bone observis? Ĉu vi bone memoris? Dudek kvinjara, blonda, grizokula, malgrasa, mezkreska kaj kun nigra jaketo. Iru al la alia hotelo!“ instrukcie kriis Ali-Ĉauŝ, kaj dume liaj okuloj ludis kvarflankan por observi ĉiun preterpasanton elirantan aŭ enirantan.

„Mi komprenis, Ali-Ĉauŝ!“ kaj la policisto foriris.

Tiu ĉi interparolado de la du policistoj koncernis Vasil Levski'n, kiun oni serĉis por kapti.

En tiu tempo la sentima apostolo estis ventinta de Plovdiv al Sofia, alvestita kiel komercisto de lano, por fondi komitaton, kiu poste fariĝis historie konata pro la rabo de la turka poŝtkaso apud la intermonto Araba-Konak. La tuta sofa polico, avertita telegrafe de plovdiva, estis mobilizita. Aroj da policistoj serĉadis lin. Ali-Ĉauŝ, la plej energia kaj konsiderema el ili, gvidis de kelkaj tagoj la serĉadon kaj donis la necesajn instrukciojn al la persekutantoj, ankaŭ precizan priskribon de la vizaĝo kaj vesto de la revoluculo.

Do la diakono troviĝis en granda danĝero; ĉiam kuraĝa kaj multimema ĝis nesingardemo, konvinkita pri la malforteco de la turka polico, memfida, eble kredanta je sia stelo — ĉar ĝis

Kvankam temperaturo de 20000° estas atentinda rekordo, tamen en sia primitiva formo — en daŭro de kelkaj milionoj da sekundo — ĝi ne povas esti utiligata ĝis la tempo de preciza esploro de ĝiaj efikoj. Sed, tiu lasta estis forte malhelpata, se ne malebligata, per la ĉion detruanta eksplodo.

Wendt kaj Irton sukcesis aranĝi la eksperimenton tiamaniere, ke la tubo, ĉirkaŭanta la draton — ĝi estis vitra kuglo, ampleksante trionon da litro — ne estis detruata.

Tiel oni ricevis la esprimeblecon de la eksplod-produktoj. Dum la eksperimento estis uzata kondensilo je kvarono da mikrofado; ĝi estis ŝarĝita (tensiita) ĝis la streĉo de 30000 voltaj.

La uzata energio estas kompare negranda, sed ĝia efiko koncentriĝas je tre maldika volfram-drato, pezanta nur 0,0005 gr., kaj je tre mallonga tempospaco; tial la energieco de la procedo.

La provo estis efektivegita diversmaniere, Kelkfoje oni senaerigis la kuglon pere de plej bonaj aerpumpiloj; la rezultigitaj substancoj povis esti analizataj spektroskope kiel ĉe la Geissler-tubo: oni tralasis fortan elektran fluan pere de specialaj elektrodol.

Aliokaze oni aranĝis la eksperimenton tiel, ke la kuglo estis komence plenigata per pura karboksido; post eksplodo oni ĝin forigis kemie, restigante kaj esplorante la formigitan gason.

Ĉe la unua esploro procedo montrigis spektroskope post la vaporigo de la volfram-drato klare la flava strio de heliumo! Apude estis rimarkeblaj strioj de hidrargo kaj nitroĝeno.

Kiel formigis la heliumo? Supozeble la kemia elemento volframo sub influo de la alta temperaturo transformiĝis je heliumo. Depost la konatigo de la disfalo de l' radiaktivaj elementoj, depost la eksperimento de Rutherford pri transformo de nitroĝeno je hidrogeno per X-radia "bombardado", la transformiĝo de unu elemento je alia povas jam neniun mirigi. Precipe interesaj estas la rapida disfalo de volframo kaj la fakto, ke tio okazas sub influo de alta varmogrado.

Ĝis nun oni opiniis la disfalon de atomoj ne influebla de la temperaturo kaj premo; oni kredis, ke la lastaj povas influi nur je la eksteraj procedoj, kiel molekula atomodisigo, sed ne je la "internaj" procedoj.

Nun ni vidas, ke tiu konvinko estis bazata sur la maleblo de atingo de sufcite altaj temperaturoj. Oni konkludas, ke la heliumo estas unu el la disfalo-produktoj de volframo.

La trovitaj hidrarg-vaporoj povis penetri tra la aerpumpilo.

La ĉeesto de nitroĝeno ne estis certe pruvita; ĝia formiĝo eĉ ŝajnas neverŝajna pro ĝia facila detruobeco, montriginta dum la eksperimentoj de Rutherford.

Dum eksplodo de la volframdrato en la karboksido duono de la drato, do 0,00025 gr. transformiĝis je 1 cm³ da heliumo.

Tiuj eksperimentoj kun alta temperaturo povas ankaŭ klarigi la cirkonstancojn sur la flka-astroj.

Oni supozas, kvankam ne certe, ke la lumantaj astroj havas ĉe sia supraĵo la temperaturon de 2800 ĝis 22500 da gradoj. Interne la temperaturo devas esti multe pli alta. Se la volframo kaj aliaj elementoj de granda molekula-pezo disfalas ĉe granda varmeco je malpli pezaj substancoj, ni vidas klarigita la faktoro de ĉeesto de granda kvanto da heliumo kaj hidrogeno, rimarkebla en la spektro de ĉiuj astroj (ankaŭ en tiu de nia suno) kaj la preskaŭ absolutan foreston de ĉiuj pli-malpli pezaj substancoj.

La demando pri la atomdisfalo estas ankoraŭ en sia unua esplorstado. Tial estas supozeble, ke la novaj esplorrimedoj, nome tiuj de tre alta temperaturo, konigos al ni multajn novajn faktojn kaj klarigos multajn, jam konitajn antaŭe.

Kompil-tradukis
Gregoro Lempert, Riga.

nun li multfoje forkuris el la manoj de siaj malamikoj — li nek suspektis ion, nek liaj amikoj en la urbo sciis ion pri tio, por doni al li pli certan rifuĝejon.

La akraj rigardoj de Ali-Ĉaŭs fiksiĝis explore al la kafejo de liĉo, apuda al la drinkejo de Trajkoviĉ, kaj li eniris ĝin antaŭ ol eniri la hotelon.

En la kafejo estis kvar personoj: unu gastulo — bulgario, alta, dika, en vesto de etropano, — sidanta sur sofo kaj fumanta "nargileon", la kafej-mastro liĉo, akriĝanta razilon, kaj lia helpanto, kiu estis razanta alian klienton, turniĝintan dorse al la pordo, kun blondaĵoj kaj nigrolana jaketo. Li estis Vasil Levski.

Ali-Ĉaŭs salutis la bulgaron kun la nargileo, kiun li konis, turnis sin al la kafej-mastro kaj demandis, kvazaŭ indifere, sed mallaŭte:

"Ĉu ne estas tie ĉi en la hotelo, liĉo, iu... komercisto?" kaj la turko priskribis la vizaĝon kaj veston de la diakono.

"Mi ne scias, Ali-Ĉaŭs, mi ne partoprenas tie," respondis la kafej-mastro kaj daŭrigis trunkvile sian okupadon, ĉar li nek konis Levski'n, nek interesiĝis eksciti, kial Ali-Ĉaŭs serĉas tian homon.

"Griza, malgrasa..." ripetis Ali-Ĉaŭs, jetinte subite rigardon al Levski, kies dorson li nur povis vidi.

Tiu ĉi interparolo, fariginta mallaŭtvoĉe, estis tamen aŭdita ankaŭ de la aliaj en la kafejo.

La mano de la helpanto ekstremita, la razilo balanciĝis en ĝi, minacante elfali. Lia vizaĝo paliĝis pro timo. La kompatinda knabo konsciis, ke li mem razas Levski'n.

Sed eĉ pli multe ŝanĝiĝis la vizaĝo de la alta bulgario, kiu fumis sur la sofo. Li estis pala kiel tolo: li estis Hristo Kovaĉev, amiko de Levski, kaj nun li antaŭsentis, ke la diakono estos perdita.

Pedagogio.

Profesoroj ĉe mezaj lernejoj, Esperantistoj!

Je la fino de aŭgusto 1923 okazos en Praha Internacia Kongreso de Profesoroj. Temo: Pedagogia preparo de mezlerneja profesoro.

Samideanoj, estas necese, ke vi partoprenante efike pruvu, ke nia ideo ne estas ridinda utopio, kiel oni opinias inter profesoroj.

Sciigu vian partoprenon al profesoro Rud. Fridrich, Brno, Královo Pole, Ĉeĥoslovakio. Petu de la Prepara Komitato Kongresa, Spolek českých profesorů, Praha II, Vojtěšská 11, ke oni permesu trakti en Esperanto dum la kongreso.

Rud. Fridrich kaj D-ro Kamaryt, por Esperanta sekcio de ĉeĥa profesoro.

Vegetarismo.

Por-Esperanta rezolucio de vegetarana kongreso.

La II-a Kongreso de Bulgaraj Vegetaranoj loĝantaj en Germanio unuanime akceptis sekvan rezolucion proponitan de s-o Krestanoff kaj legotan dum la III-a Int. Veg. Kongreso en Stockholm:

"La Kongreso de la Bulgaraj Vegetaranoj loĝantaj en Germanio, okazinta la 8.—10. aprilo 1923 en Dresden, rekomendas al staj samideanoj la internacian lingvon Esperanto kiel plej potenca rimedon por disvastigo de iliaj ideoj kaj por atingo de la celo: la kreo de la multe dezirata Nova Societo sur la bazo de Amo, Frateco kaj Paco de l' homoj (popoloj)."

Katolikaro.

Aŭstria Katolika Ligo Esperantista.

"Aŭstria Katolika Ligo Esperantista" kaj "Katolika Unuiĝo Esperantista" en Wien decidis en sia lasta komuna ĝenerala-kunveno, ke estonte pro simpleco estos nur unu granda unuiĝo, t. e. "Aŭstria Katolika Ligo Esperantista" kun unu sola prezidanto. La katolikaj Esperantistoj en Aŭstrio estonte estos senperaj anoj de AKLE kaj povos arĝi en la diversaj distriktoj de Wien kaj en la diversaj lokoj de Aŭstrio por ekzercado de la lingvo ktp. en oportunaj ejoj, gvidataj de grupestroj.

La multmerita ĝisnuna prezidanto, provinjala moŝto P. Franz Meštan, ne plu povos esti prezidanto, ĉar li devas kiel provinjala de piaristoj estonte loĝi en sia provincalejo en Krems a. Donau. Anstataŭ li de nun prezidos AKLE-on la en Wien multekonata paroĥestro de la "Schottenparochie" P. Wolfgang Nedwid O.S.B., dekanato de la 1-a, 2-a kaj 3-a distriktoj en Wien. Tamen prov. Meštan restos prezidanto de la tutmonda "Int. Katolika Unuiĝo Esperantista" (IKUE). La centro de AKLE restas en Wien, 8-a distrikto, Piaristengasse 43, piarista monaĥejo. La kunvenoj okazas ĉiumerkejde je 5—7 h. p.m.

Plue AKLE decidis, ke estonte la raportilo de la ligo estu la ĵurnalo "Die Neue Zeitung", ĉie ricevebla, po numero nur 400 kron. En ĝi aperos ĉiam sabate sub "Vereinsnachrichten" sciigoj de AKLE ankaŭ pri ĝeneralaĵoj Esp. okazintaj. Kiu ajn do en Aŭstrio deziras estonta sciigi ion novan pri la katolika aŭ ĝenerala Esp. movado, legu komencante de 19. majo ĉiusabate "Die Neue Zeitung, Unabhängiges Tageblatt", kiu — eldonata de al Esperanto favora s-o Komerzialrat Hans Böslauer — estas la unua grandforma regule pri Esp. aferoj raportonta ĵurnalo en Wien.

Merkredon, 23. majo, je 5 h. p.m. okazos Esp. Diservo de AKLE per la nova prezidanto dekanato P. Wolfgang Nedwid kaj Esp. prediko de s-ano P. Plank en la Piarista Preĝejo en la 8-a distrikto, kun kantado kaj poste kunveno. (R. M. Frey)

La vizaĝo de Levski, revidiganta en la spegulo, restadis indifere, kaj trunkvila. Nek veĝo ekstremita, nek konfuzo aperis sur lia malvarma fizionomio. Tiu ĉi necesa, eksterordinara memregado ne lasis lin eĉ dum la plej teruraj danĝeroj, per kiuj ornamigis lia nekredbla, danĝerplena vivo.

All-Ĉaŭs sidiĝis sur la sofon kaj ekfumis cigaredon.

"Kiel vi fartas, Hristo-efendi?" Ĉu malsana vi estas?" demandis All-Ĉaŭs la sofanon, rigardante lian palan kaj ŝanĝiĝintan vizaĝon.

"Jes... Ali-Ĉaŭs... jes... ne! Pro la varmego..." elmurmuris la timigita Kovaĉev.

"Knabo! Tenu atente la razilon, ĉar vi tranĉos min!" rimarkigis severe Levski al la knabo.

La turko turnis sin nevole al la nigra jaketo de l' apostolo kaj ekparolis pri bagateloj kun Kovaĉev.

"Tiu ĉi sentaŭgulo atendas ĝis finiĝos la razado, por vidi la diakonon en la vizaĝon... li estos perdita!" meditis Kovaĉev. Sed en ilu ĉi kriza minuto, la trunkvileco kaj indiferecenteco de la diakono kuraĝiĝis lin; inspiro venis al li: li konjektis, ke All-Ĉaŭs sentas certan inklinon al drinkado.

Li invitis ilun: "Ĉu glaseton da brando?"

La turko akceptis. Li englitis kvindek gramojn da brando, ekŝmacis pasie kaj per kapklino li respondis la saluton de Kovaĉev.

"En varma vetero la brando malvarmigas," rimarkigis Kovaĉev, "ĉu vi akceptos plian glaseton?"

Kaj ne atendante respondon, li mendis plian kvindek gramojn da brando. La turko eltrinkis ankaŭ ilin, forte gargarinte sian buŝon per akvo.

Por distri tute lian atenton, Kovaĉev ekrakonitis mallaŭte kun insida rideto certan voluptan okaz-

*) Efendi (turke) sinjoro.

Internacia Sporto.

Aviado.

Trans la amerikan kontinenton.

La amerikaj aviadistoj MacReady kaj Kelly, mondrekorduloj en daŭra flugado, startis la 3. 5. je 13.38 h. apud New York kaj alirigis la 4. 5. je 12.37 h. en San Diego apud la Pacifiko. Ili do transflugis la kontinenton (3900 km) en 23 horoj.

Ekspozicio de aviadiloj en St. Gallen (Svis.). okazos la 26.—28. majo. Inter la ekspozitajoj estas multaj vel- kaj glitaviadiloj kaj modeloj de senmotoraj aviadiloj, pruvo por tio, ke — post la fortaj impulsoj per Germanujo kaj Francujo — ankaŭ en Svisujo kreskas la intereso pri senmotoraj aviado.

Aŭtado.

En n-o 134 ET jam mallonge raportis pri la dekkvara "Targa Florio" — konkurso, kiu ĉiujare okazos en Sicilio tra laciga monta regiono (longeco 432 km). Jen la rezulto: 1-a Sirocci per aŭto "Alfa Romeo" (Itala konkursanto), kiu atingis rapidecon ĝis 59 km pohore; 2-a Ascari (same): 3-a Minola per amerika aŭto "Steper". Franca konkursanto Boillot per aŭto "Peugeot" (kiu gajnis la "Targa Florio"-n en la jaro 1920) alvenis 7-a. (R. Camurri)

Ciklado.

La ciklokonkurso München-Zürich (330 km) gajnis la sviso Suter en 12:42 horoj.

Kurado.

La konkuro Italio—Hungarujo—Aŭstrio en Meran rezultigis: La hungaro Gerö venkis je 100 m en 10,8 sek. antaŭ la itala majstro Zucca kaj la aŭstro Rauch. La konkurso de 800 m gajnis la hungaro Benedek en 2:08,8 min. antaŭ la italo Cominotto kaj la aŭstro Fried. La konkurso de 1500 m gajnis la italo Ambrosini antaŭ la hungaro Nemethy kaj la aŭstro Haidegger.

Piedpilklo.

La finludo pro la tutangluja pokalo (28. 4. en Wemblej apud Londono) rezultigis venkon de "Bolton Wanderers" kontraŭ "West Ham United" 2:0. Ĉeestis ĉ. 200000 rigardantoj, i. a. la reĝo. Pro la baraktado de la homamaso la bariloj rompiĝis kaj kelkaj dekmiloj eniris senpage la arenon; milo da personoj vundiĝis en la premedo. (J. W. E. London)

I. F. C. Nürnberg kontraŭ Spielvereinigung Leipzig 2:2 kaj kontraŭ Sportklub Dresden 3:1. Landa ludo Aŭstrio—Hungarujo antaŭ 40000 rigardantoj 1:0.

Ĉeĥoslovakio—Danujo en Praha antaŭ nur 15000 rigardantoj (pro sufokiga varmego) 2:0. Majstro de Meza Germanujo restis en Leipzig la klubo Guismuts el Dresden per 1:0.

Diversaĵoj.

La religia krizo en Rusujo.

Antaŭ kelka tempo la civilizita mondo estis alarmita per la sciigo, ke la sovieta tribunalo en Moskvo mortkondamnis kelkajn altrangajn ekleziulojn. Inter ili la ĉef-



Pruvu, ke ekzistas dekmil!

UEA bezonas dekmil membrojn.

ALIĜU AL UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO !!

Vi parolas pri centmiloj da Esperantistoj.

intajon pri malbonfame konata sofanino, kio pleniĝis je malsekajo la okulojn de la voluptama turko, kiu glitis pliajn cent gramojn da brando je unu fojo.

"Nun li povus foriri tute ne ekvidite," meditis Kovaĉev, jetinte rapidan, multsignifantan rigardon al Levski, kiu levigis de la seĝo kaj ordigis sian kravaton antaŭ la spegulo.

Sed kun teruro li vidis, ke Levski, anstataŭ forŝteligi senbrue, turnis sin rekte al la turko, purigis sian veston kaj pagis al la knabo. All-Ĉaŭs nevole sin turnis kaj lin ekrigardis. La griza, klara, trunkvilaj okuloj de la apostolo renkontiĝis kun tiuj de Ali.

La haroj de Kovaĉev stariĝis sur la kapo.

Sed li tuj komprenis la situacion.

"Je via sano!" li salutis ĝentile Levski'n, laŭkufite.

"Gratulon, ĉelebi!" salutis lin ankaŭ All-Ĉaŭs per rapida, larĝa temena⁴⁾ kaj ree sin turninte al sia kunparolanto avide daŭrigis aŭskulti.

Levski eliris tra la pordo.

Post duonhoro All-Ĉaŭs rememoris pri sia misio, lasis Kovaĉev'on kaj eniris la hotelon por daŭrigi la serĉadon, observante la gastojn.

En tiu ĉi sama minuto tri policistoj kondukis triumfe kvin timigitajn bulgariojn, arestitajn en diversaj hoteloj.

Ili ĉiuj estis grizokulaj kaj kun nigraj jakoj. Kovaĉev, staranta ĉe la pordo de la liĉa kafejo, rigardis konfuzite tiun ĉi viktimojn de la turka sovaĝeco.

Dume, ĉifona vilaĝano kondukis ĉevalon, ŝarĝitan je karboj.

"Ĉu vi ne volas aĉeti mian karbon? Mi ja malkare ĝin donos al vi!" diris la vilaĝano.

*) Honoritolo pro sinjoro ĉe la turkoj.

*) Temena orienta saluto, per meto de la dekstra mano sur la koro kaj sur la frunto.

episkopon Cieplak, pro renitenta konduto kontraŭ la sovjet-registaro.* Ĉi tiuj faktaj estas nur kelkaj el la simptomoj de la gigantaj fermentecaj malkvietoj kaj malkontento, kiuj ekkapis la rusajn ekleziajn organizojn kaj la religian senton de rusa popolo de post la bolŝevista revolucio. — Oni perceptas du formojn de ĉi tiu movado. Parte estas la batalo inter la ekleziaj kaj ŝtataj potenculoj, parte ekzistas gravaj ekŝanĝoj de religiaj celoj kaj de ekleziaj internaj aranĝoj.

Eble oni memoras la ŝangan kaj ekstreme kruelan lukton de la tica registaro kontraŭ la eklezio en ĉiuj regionoj de l' granda regno pro konflikto de la riĉaj trezoroj de la preĝejoj. Komprenible la patriarkoj energie protestis kaj defendis la proprajn ĉiumaniere, kaj kvazaŭ vengaj ago estas ĉi tiu proceso aŭ lasta spirilo de l' batalo inter ambaŭ partioj pri la posedo de la bienoj ktp. —

Vidante, ke drakona perforto ne kondukos al kontentiga celo, la registaro tre taktike uzis pli efikan metodon al militante la eklezion. Oni Intencis ĉiurimede rompi la potoncon de la ortodoksa eklezio kaj, timante, ke oni per fizika perforto firmigus fine nur la moralan aŭtoritaton de tradicia sistemo, oni opiniis necese, subfosi ĉi tiun aŭtoritaton kaj anstataŭi la ortodoksojn elektante pastrojn al la sovieta reĝimo favorajn kaj sindonajn. Tial pastroj nun ekkomencis reverte insultante kaj riproĉante la ortodoksojn estrojn. Delegitoj vojaĝis tra la lando predikante en tiu senco: fine la patriarkoj estis devigitaj eksciigi al siaj oficoj. En ĉiuj guberniaj ĉefurboj okazis iliaj "revolucioj" celantaj forpuŝi — eĉ perforte — la episkopojn antilbolŝevistajn. Ilin anstataŭis "progresemaj" ekleziuloj, kiuj formis la plimulton de la "Wyschskoje Zierkownoje Uprawlenie." (Supera eklezia administracio). Ekstis nun la "Schywaja Zerkow" (Eklezia unuigo), kiu "adaptis" majstre la ortodoksan religion al la bolŝevista doktrino. Rezultis tre strangaj faktaj el tiu edziĝo. La "papo" de la Sankta sinodo, Lwow, eĉ deklaris, ke la idealoj de la ortodoksa eklezio estis de post ĉiam identaj al la idealoj de la franca revolucio kaj de la komunista internaciano.

Ĉi tiuj menciitaj faktaj sendube sufcias por ekkoni, ke la fundamento de la rusa-ortodoksa eklezio estas foriege ekskuita kaj iom post iom distalas. Sed formigis ankaŭ multaj sektaj kaj, atente observante lian evoluon, oni rimarkas, ke absoluta ŝanĝo montrigas koncerne la religiajn sencojn en Rusujo. Vivigis nova kulturepoko, kaj eble ekfloros nova formo, venos pura renaskiĝo de la ortodoksa eklezio, kiu sekvos la morton de la malnova. Tion jam profete diris Dostojevski. — M. Butin.

*) Jus komenciĝis la proceso kontraŭ la patriarko Tifon la ĝianuna antilbolŝevista ĉefo de la rusa-ortodoksa eklezio.

Gazetaro.

Jugoslavenski Narod, Split. Regule ni ricevas tiun ĵurnalon, sed ne scias kial, ĉar ni ne trovus en ĝi artikolojn pri Esp., kaj bedaŭrinde ni ne komprenas la serbian lingvon. The Daily Herald, 1. 5. Pri kongresoj de SAT, de britaj Esperantistoj kaj la XV-a.

Norsk Bokbinder-Tidende, Kristiania, 1. 5. Du interesaj social-ekonomiaj komunikoj en lingvoj Esperanta kaj norvega.

Der Bund, Bern, 5. 5. Detala art. pri la konferenco en Venecio, de Dr Sp.

Le Petit Méridional, Montpellier, 28. 4. Art. pri Esp. budo ĉe la foiro de Paris (la Esp. grupo de Perpignan metas sin je la dispo de la komercistoj, kiuj volas fari reklamon ĉe la Esp. budo, por traduko de leteroj ktp).

Volkblatt, Chronik kaj Wacht, gazetoj en Salzburg (kiuj numeroj?) publikigis artikolojn pri okazinta konferenco en Venecio, Nürnberg ktp.

O Escoteiro, Rio de Janeiro, 15. 5. Art. "La skoltaj kaj Esperanto", trad el ET.

Grazer Zeitung, 14. 4. Art. pri Venecio, de s-o Bartel. — Esp. kaj foiroj.

Grazer Volkblatt, 12. 4. Pri Venecio.

Esperanto en nederlandaj gazetoj.

"Holanda Esperantisto" de 5. 5. raportas, ke dum marto oni sciigis pri 40 artikoloj pri Esperanto en la nederlanda gazetaro.

Jen Printempo Vi!

De Eduard Moerike.

Jetas sian blurbandon
Junprintempo tra l' aero;
Dolĉaromo, novespero
Revplenigas jam la landon.
Ŝonĝas la viol'. —
Venos ĝi baldaŭe...
Jen! Mallaŭta harpa ton' je mol!
Jen Printempo Vi!
Vin mi sentis aide!

Traduko el la germana originalo.

Solvoj

de la enigmoj el n-o 135.

1.	2.
Tuko	Ŝakto
krio	ĉamo
okro	afero
komo	vakso
pala	irido
ŝelo	nordo
peno	spaco
deko	kreto
oni	III
	Jodo
Korolenko.	Ŝavinskij.

Memoru pri Dek-kvina!

Socialismo.

Ĉu tri vicoj aŭ du? La uzado en Usono.

La laborhoraj en amerikaj industrioj tute ne estas unuformaj. La entabeligo de manufakturoj por 1919 montris, ke 48,6 procentoj el la pli ol 9000 000 salajruloj en amerikaj manufakturaj industrioj estas okupataj en entreprenoj, kiel la ordinara laborhoraj estas 48 horoj semajne aŭ malpli. En 1914 la proporcio estis nur 11,8 procentoj.

En artikolo en la „Int. Labora Revuo“ s-o Horace B. Drury, esploranto por la Komitato de la Federitaj Amerikaj Maŝinistaj Societoj pri Laborperiodoj en Kontinua Industrio, rimarkigas, ke la ŝtalinduŝtario estas la plej elsteranta el la industrioj en Usono, kiuj konservis duvicajn sistemojn, kun 12 horoj vice.

„La United States Steel Corporation“ (Usona Ŝtālkorporacio), kiu produktas iomete pli ol 40 procentoj el la feraj kaj ŝtālaj produktoj de la lando, diris en 1919, ke ĝi havis pli ol 69000 laboristojn laborantaj 12 horojn tage. La plejmulto el la grandaj sendependaj ŝtālkompanioj ankaŭ laboris duvice. La ŝtālindustrio en 1919 okupis entute ĉirkaŭ 150000 homojn laborantajn po 12 horoj en vico.

En la ceteraj metalindustrioj estas kutime labori trivice.

La ceramikaj industrioj aktuale trairas diversajn stadiojn de la transiro de 12-horaj al 8-horaj vicoj. En la kemikaj industrioj, la vicoj kutime daŭras 8 horojn, kun escepto de sukerrafino. La grupo de industrioj, kiun la usonanoj nomas „grupo de peza ekipado“ (heavy equipment group), kiu enhavas la paperan, farunan, kaŭĉukan kaj aŭtomobilan industriojn, laboras je la plimulto trivice. La publik-utilaj industrioj, kiel tiuj de gaso, akvo kaj transportado, progresas laŭ la direkto al ĝenerala 8-hora vico.

S-o Drury konkludas, ke la akcepto de 8-horaj vicoj en Usono ne fariĝos unuforme aŭ samtempe, sed okazos kiam kaj kiel la membroj de ĉiu industrio, subtenataj de publika opinio, konvinkiĝos pri ĝia dezirindeco.

Informservo de Int. Lab. Of.

Parolejo.

173. Instigo al la XV-a. (Rilatas al n-o 161.)

Mi turnas min per tio precipe al la gvidantoj de klubaj kursoj kaj mi intencas instigi la XV-an, ke oni aranĝu fakajn kunvenojn por kursogvidantoj. Estas tiel multaj gravaj aferoj, kiujn oni povus kune prilakiti kaj de kies ĝusta solvo nia movado povus multe profiti. Mi volas menci tiel ĉi nur kelkajn faktojn:

Antaŭ ĉio, kiel la kursanoj forrestas iom post iom tiel, ke la kursifinoj partoprenas apenaŭ la triono de la komenco nombro? Mi opinias, ke ĉi tiu estas konvinkita, ke la kaŭzo de tiu ĉi malbono estas nur la malĝusta instruometodo en la klubaj kursoj. Oni instruas Esperanton sammaniere kiel la aliajn lingvojn. Tio ĉi instruometodo eble estas bonega por la lernejoj, kie la lernantoj jam kutimiĝis la tia metodo, sed ĝi ne taŭgas por la klubaj kursoj. La instruometodo por Esperanto devas esti almezurita al la esenco de Esperanto. Oni ĉiam faras reklamon per tio, ke Esperanto estas plej simpla, plej facile lernebla ktp., kaj kiam la kursano venas en la kurson, li devas konstati, ke Esperanto oni sammaniere instruas kiel la aliajn lingvojn, kaj ke li egale devas lerni vortojn kaj egale veni kiel en aliajn lingvojn. Ĉi tiu ĉi metodo estas la esenco de Esperanto? Kial jam de la komenco de la kurso oni malfaciligas la instruadon per prilaktado de vortoj, kies radikoj estas tute fremdaj kaj nekomprenblaj al la kursanoj? Kial oni ne uzas en la kursoj por komencantoj precipe nur tiajn vortojn, kies radikoj estas prenintaj el la gepatra lingvo de la kursanoj aŭ kiuj estas internacie konataj? Ĉu estas necese, ke oni prilaktas jam en la unuaj lecionoj temojn, kiel „la ĉambro“, „la lernejo“, „la strato“ ktp. anstataŭ konstui nur simplajn frazojn kun helpo de facile komprenblaj vortoj? Aŭ, ĉu estas pli bone, se oni antaŭ ĉio penus, ke la kursanoj bone ekzercu la Esperantan gramatikon kaj vortofaradon, rez nur kun helpo de malmultaj, de ili facile rekoneblaj kaj lerneblaj vortoj, por ke ili kapabliĝu plej baldaŭ uzi Esperanton skribe? Unu ĉefa eco de Esperanto estas, ke oni scipovas la gramatikon kaj la vortofaradon, ke kun helpo de bona vortaro oni tuj povas ĉion Esperantan legi, traduki kaj ankaŭ korespondi. Tio estas tute neeble ĉe la aliaj lingvoj. Kial do oni ne eluzas precipe tiun ĉi econ de Esperanto? Ĉu, nur sekve de tio ĉi eco, estas necese, ŝarĝi la komencantojn per la lernado de fremdaj vortoj kaj kaŭzi pro tio nur enulajn instruadon? Ĉu ne estas pli bone, antaŭ ĉio kun la plej malgranda peno kapabliĝi la kursanojn plej baldaŭ uzi Esperanton skribe, anstataŭ ĉiam nur lerni parkere kaj meĥanike diversajn frazojn kun multaj fremdaj vortoj por povi baldaŭ paroli Esperante? Ĉu ne kaŭzas grandan fervoron la nura koncilio de la kursano, ke li estas kapabla jam post kelkaj lecionoj uzi Esperanton praktike (kun nura helpo de bona vortaro) por traduki, legi kaj eĉ korespondi?

Kio estas pli grava, kapabliĝi la kursanojn, plej baldaŭ uzi Esperanton skribe, aŭ instrui laŭ la instruometodo de aliaj lingvoj kaj peni plej baldaŭ paroli Esperante?

Mi opinias, ke la unua estas pli grava por Esperanto, ĉar oni eluzas antaŭ ĉio la esencon de Esperanto. Baldaŭ paroli Esperante, ne estas tiel grave, ĉar nur la plej malmultaj havas okazon kaj estos devigataj, paroli Esperante, kun alilandanoj, sed legi, traduki kaj korespondi, ĉiuj havas okazon plej baldaŭ! Kaj tial estu ĉiam nia celo en la klubaj kursoj: kapabliĝi la kursanojn, ke ili plej baldaŭ bone scipovu la Esperantan gramatikon kaj vortofaradon. Paroli Esperante oni ja povos, se oni diligente legos, tradukos kaj korespondos kaj tiamaniere akiros la necesan vortofaradon!

Kiel bonege estus, se oni en komuna faka kunveno starigus praktikan instruoplanon por klubaj kursoj, per kiu estus p'feligata la laboro al la kursogvidantoj kaj al la kursanoj! Ĉu ne valorus ĉio tio separatan fakajn kunvenojn? Kiu konsentas kun mi kaj kiu volus antaŭlabori kun mi pro tio ĉi celo? Mi tre volonte akceptas ĉiun proponon kaj kunlaboron kaj mi nur ĝojas, se tre multaj aliĝus.

Kreibich, Emil

UEA-delegito, Kladno, Bohemo, Zelezárny.

Rim. de red. Allan artikolon pri la sama temo ni povas publikigi nur, kiam ni havos tempon por kopii ĝin, ĉar la kompostisto ne povas legi la originalan manuskripton.



Kongreslibro Nürnberg.

Samideanoj ĉiulandaj bonvolu interesiĝi gravajn firmojn kaj societojn de sia urbo pri

anoncado en la kongreslibro.

Unu paĝo kostas 120000, duona paĝo 65000, kvarona paĝo 35000 germ.mk.


Belaj ilustraĵoj

Postkartoĵoj pri Nürnberg'aj vidindaĵoj

kun Esperanta teksto estas jam nun livereblaj kontraŭ antaŭpago. La prezoj (inkluzive sendkostoj) estas por 30 diversaj kartoj 4000, por 15 kartoj 2500 germ.mk.

Mendojn akceptas la LKK. Suŝta adreso:

Esperanto, Nürnberg, Germani.



Grava por kongresanoj.

„LA ESPERANTISTO EN GERMANIO“ estas la titolo de baldaŭ aperonta gvidlibro tra la germana lingvo, verkita de Hans Koch ekzamena komisararo ĉe la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko en München. Ĝi servos speciale ankaŭ al vizitintoj de la XV-a.

La libro tute ne volas prezenti kompletan gramatikon, nur tion, kion la voĉganto kredible bezonos. Por tia celo ĝi estas verkita kaj tial la principo ne estas detaleco, sed prefere koncizeco. La aranĝo de la materialo estas konvena al ĉi tiu principo, tiel, ke estas eble elpreni la libron en relative mallonga tempo kaj baldaŭ uzi la fruktojn de kelkmonata penado.

Al ĉiuj klientoj, mendantaj la libron antaŭ ĝia apero, ni konsentas rabato de 20% (je siatempa fiksa vendprezo), se ili kun la mendo sendos antaŭpagon de 2.— frk. svis. aŭ egalvaloron en alia valuto.

Malbonvalutoj havos la saman rabaton, se ili sendos 3000 gmk. Kongresanoj, kiuj deziras tuj komenci la studadon de germana lingvo, ricevos laŭdeziro la presfoliojn de la verko unu post la alia, tuj post presado.

La unua folio, sendita al ni de la eldonejo, pravas spertecon kaj diligentecon de la aŭtoro, praktikan aranĝon kaj bonan preson. Se ni rajtos juĝi laŭ la unua folio, ni povas varme rekomendi la verkon al ĉiu kongresano, kiu interesiĝas pri la germana lingvo.

Mendu ĉe la eldonejo: Sudgermana Esperanto-Eldonejo, Oskar Ziegler, Delsenhofen bei München.

La viro sur la palisaro.

Eksupo, ke ĉiuj el la laboristoj en la vastega, mondo maldormiĝus morgaŭ matene kun nur unu konvinko en la menso, kaj permesu do, ke tiu konvinko estus pro la socialista doktrino. Supozu, ke ĉiuj sopirus al la feliĉeco kaj justeco tenataj en la promeso socialista.

Ke tio estas ebleco nur en la sfero de konkjekto, mi konstatas tiel klare, kiel vi, kara leganto; kaj mi ankaŭ konstatas bone, ke estos la fajfegoj de la fabrikejoj, kiuj alvokos nin morgaŭ kaj postmorgaŭ; — tamen nur permesu momente, ke ni imagas, ke la pebelator volas super io alia por posedi kaj administradi la ilojn, per kiuj ili fabrikas stajn bezonaĵojn kaj nutraĵojn. Ni klopodos senfine por influi la homojn ekdeziiri tion, sed eĉ se ili ja volis tion, ĉu ili povas administradi la aferojn, post kiam ili gajnis la ŝancon; Ĉu la laborantoj havas la lertecon kaj klarecon postulatan de tia komplika afero, kia estas nuntempa socio?

Vi eble respondas jese, eble nee; tamen vi konsentos, ke la laborantoj de la mondo nepre trovos la taskon pli malpli facila laŭ la instruoj kaj ekzercado, kiujn ili travivas antaŭ la kriztagoj.

Ekzistas en la mondo unu loko hodiaŭ, kie la laborantoj efektive estas la kooperan sistemon kaj laborante lernas. Ili laboras kun ardo kiu igas la tienaskitojn malfermi la buŝojn kun mirplena elvoko: „Kio estas al ili?“

La fajfo sonas; iam la laborantoj haltas, iam ili daŭras sen rigardo je la horo; dimanĉe, festtage kaj ĉe la laboro ili ridkantetas sed, ial, oni ne aŭdas eĉ unu vorton pri la filozofio de socialismo.

Kaj la tienaskitoj rigardas la infanojn en la kampoj lernantaj kulturil la kreskaĵojn kaj tiujn en la urbeto lernantaj brikmasoni kaj tiujn en la fabrikejoj lernantaj tani la ledon kaj fabriki la ŝuojn, kiujn ili poste portos, kaj ĉi tiu fartaĵo sen ia direkto de ekspluatisto tute senkomprena pri la signifo de tia neŝancela gaja laboro aŭ pri la fakto, ke la laboraĵo estas sole por la laboranto.

Se tiuj tienaskitoj aŭskultus, ili aŭdus kelkfoje vorton aŭ frazon el fremda lingvo, kaj se ili ĉestus kunvenon de la maturuloj, ili aŭdus strangajn herezojn kaj ideojn tiel fremdajn al ili, ke ĉi tiuj povus esti ĉerpitaj el la sanskrito; sed ili vidas nenion, aŭdas nenion, imagas nenion, escepte ke tiu ĉi stranga popolamano estas frenezularo, kiu laboras kvazaŭ la diablo pelus ĝin.

Iam, je okazo, kiam la tienaskitoj kondukas solenan enterigon de unu el la veteranoj de preskaŭ forgesita milito, ili marŝas malantaŭ la muzikistaro, kiun tiuj frenezuloj provizas, kaj tiam ili eksclaus, ke la frenezuloj estas ĝenitaj kaj amikemaj —. Spite, la fakto restas, ke ili laboras preter la limoj raciaj.

Ĉu estas iu leganto de tiu ĉi gazeto simila al la tienaskito? Ĉu oni povas rigardi tian laboron ne ekvidante eĉ la plej malgrandan ekvidon pri la signifo de tiu ĉi frenezeco?

Sidiĝu sur la palisaro apud la tienaskito kaj vidu vi mem per lego de dektri-mil-vorta broŝuro pri la signifaj, kiujn ilaj okuloj vidas, sed ne komprenas.

Rigardu kaj lernu, ĉu tio ne estas laŭ mia pretendo la plej grava universitato por kooperaj komunumaj konstruantoj, kiun vi jam imagis. Petu per via legebla adreso la broŝuron de E. A. Young, Balboa Heights, Canal Zone, Panama. Sendota kiel presajo kontraŭ du respondokuponoj; kiel letero 4 resp. kup.; rekomendite 6 resp. kup.

NEDERLANDA ANONIMA SOCIETO
LUKSA-PAŬO FABRIKOJ
ANTAŬE HENRI J. CARELS.
50 BUTIKOJ: DEN HAAG, HAARLEM, AMSTERDAM.
LUNĈEJO CARELS (ĈEFO: H. A. SCHARWÄCHTER.)
DEN HAAG, 65 WEIMAR STRAAT.
ONI PAROLAS LAS ESPERANTON.

Eldona Kooperativo
Fako de Sennacieca Asocio Tutmonda
Leipzig-St., Ĉimstr. 1 (Germ.).
La famkonata ĉefverko de la klasika mond-literaturo:
Goethe: Faŭsto I
Tradukita de N. Barthelmess, ano de ELA. Kun portreto de Goethe. Kun antaŭparolo de s-ino Hankel.
Prezo aŭfranka: por bonvalutaj landoj: 1 dol.; por mezbonvalutaj landoj: 7 fr. frk.; por malbonvalutaj landoj: 5000 gmk. aŭ egalvaloro.
Ĉiu ajn Esperantisto devas nepre posedi ĉi tiun libron. Plej bona propagandilo.
Internacia legolibro „Ni legu“
Enhavas tradukojn el 18 lingvoj.
Plenumata estas nur mendoj akompanataj de la mono. Germanoj preferu pagu al poŝtĉekoj: Leipzig, n-o 6855.



La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof
Inda memorlibro, preita sur luksa papero, kun multaj ilustraĵoj laŭ originalaj fotoj. Nepre havignda komplemento al la libro de D-ro Privat: La vivo de Zamenhof.
Prezoj: por malbonvalut. 0,75 gmk. multpl. per ŝtalo. por bonvalut. 0,70 frk. aŭ egalvaloro.

Taglibro de Vilagpedelo
Interesa romansimila rakonto de la dana verkisto Blicher. Tradukita de s-ano Bulhuus, LK-ano. Rekomendita de ELA.
Prezoj: por malbonvalut. 0,75 gmk. multpl. per ŝtalo. por bonvalut. 0,70 svis. frk. aŭ egalvaloro.

Oni ridas
Bela kolekto de veraj perloj de bonhumoro kaj spirito. De s-ano Rieck. Rekomendita de ELA kaj revizita de Zanon, Literatura redaktoro de ET.
Prezoj: por malbonvalut. 1.— gmk. multpl. per ŝtalo. por bonvalut. 1.— svis. frk. aŭ egalvaloro.

Per sendkostoj oni aldonu 10% al la supre nomitaj prezoj
Butin & Jung, Godesberg (Germanujo)
Esperanto-eldonejo, Bahnhofstr. 50
Poŝtĉeka konto Köln 920 56.



ALBANIO
Broŝurforma prelo de interesa artikolo el „Internacia Komerc“ n-o 1.
16 paĝoj, kun du ilustraĵoj.
PREZO:
bonvalutuloj 0,30 svis. frk., malbonvalutuloj 0,30 gmk. X ŝtaloŝilbro. ET-abonantoj la prezo de unu ET-numero (pagon ni prenos laŭdeziro de la abonkonto).
Eldonejo „Esperanto Triumfonta“
(T. & H. Jung), Horrem b. Köln.
Ni liveras nur librojn de ni mem eldonitajn. Pro aliaj verkoj ni turni al Butin & Jung en Godesberg, Germ.

Anoncetoj.

- NASKIĜO. — La 29. apr. naskiĝis nia dua infano lohan Gerard. Patrino kaj infano faras bone. Gesinjoroj G. Woud en Wormerveer, Nordeindestr. 95 (Nederl.) [1]
- EDZIĜO. — L. Lichtenstein kun I-ino Adela Heitler, ambaŭ el Warszawa, 17. 4. 25. [1]
- MORTO. — La 1. apr. mortis s-ino Zaida Kaplan, edzino de s-o M. L. Kaplan en Wolkowysk. [1]
- GLUMARKOJ pri la konferenco en Venetia. 100 por 1 svis. frk. aŭ 2 fr. frk. aŭ 2 lir. aŭ ega valoro. Pri la foto de Budapest por duono de la nomitaj prezoj. — P. Balkanyi, Budapest, VI. (Hung.) Hajos-u. 15. [4]
- KIU SAMIDEANO helpas junan germanan kompostiston trovi pozicion en eksterlando. Leteroj sub „R. K.“ al la administracio de ET. [1]
- JUNA FINNLANDA STUDENTO serĉas en Nürnberg amikan familion. Ĉe kiu li povas loĝi dum la XV-a, kaj amikojn, kiujn li vizitos post la kongreso, en Nürnberg, Lyon, Barcelona, Sabadell, Dresden kaj Berlin. S-o Heikki Hjelte, Pietarinkatu 18. C. en Helsinki (Finlando). [1]
- BILDOJ DE NÜRNBERG, aliaj antikvaj urboj, Alpoj, aliaj montoj, kasteloj, pejzaĝoj ktp. orig. fotoj nun 9 (anst. 6) kontraŭ 2 skand. kr., 2 sv. fr., 2 ŝil., 5 fr. aŭ belg fr. aŭ egalvaloraĵ monbiletoj. H. W. Manske, en Berlin-Schmargendorf, Brelesir. 4. [1]
- FILATELISTOJ! Kiu sendas al mi 100—1000 poŝtmarkojn silandajn nedifektajn, ricevas saman kvanton de Hispanujo laŭ lveri 1923. Gabriel Alomar, Prez. de EKP, str. Vallori 14 en Palma de Mallorca (Hispanio). [12]

Korespondoj kaj Interŝanĝo.

- Filatelistoj! Mi deziras interŝanĝi pm. (50—100) kun tiu-mondo. Samvalore mi resendus al nia lando, i.e. Augustio Klau, Rákospalota, Öhrház u. 19. (Hung.) [2]
- Atentu! S-o Leonard Lange, Niżewicz (Pol.) deziras interŝanĝi let., il. pk., pm. (nedifektajn, ne malpli ol 60 pec) polajn kaj rusajn, kontraŭ holandaj kaj eksterlandaj pm. Sendu Esp. librojn; rekompenco laŭ deziro. Mi intencas partopreni la XV-an. [2]
- S-o John Backlund, Klostergarten 5. en Eskilstuna. (Sved.) deziras interŝanĝi pm. kun iuta mondo krom Germanujo kaj Polujo. Ne sendas unue. [2]
- Mi deziras interŝanĝi pm. de kiu ajn lando, sendas ĝis 50 pm. Joderico Debarbieri, Piazza S. Mateo n-o 14 piano 2 en Genova (Ital.). [2]
- Viktor de Merlier, instruisto-studento, Ledeganckstr. 8 en Gent (Belg.) deziras korespondi kun la tuta mondo. [2]
- S-o Erich Schicht, hem. stud. en Seifersdorf ap. Reichenberg (Ĉeĥoj.) deziras interŝanĝi pm. kun seriozaj kolektantoj, il. pk. kaj Esp. gazetojn kun ĉiuj landoj. [2]
- Fraŭlo Alois Giessen, Kolpingstr. 25 en Cleve (Rheinl. Germ.) deziras ricevi por sia kolekto il. pk. ĉi ĉiuj landoj. Mi tuj resendus beleĝan pk. al ĉiu, kiu skribas al mi, [2]
- F-ino Olga Ihander en Pietarinki, Alkolma (Finnl.) deziras korespondi kun kelkaj geamideanoj inter 20 kaj 50 jaroj per il. pk. kaj leteroj, por perfektigi en Esperanto. [2]
- Kvar amikoj serĉas korespondadon kun seriozaj fraŭlinoj inter 18 kaj 24 jaroj, por posta edziĝo. Adr.: Heint. Heutmann, Landstr. 76, Friedr. Haack, Landstr. 75, Franz Seivalka, Silnestr. 70, Josef Švarc, Rossheidestr. 66, ĉiuj en Gladbeck i. W. (Germ.). [2]
- F-ino Maria Sterned, studentino en Alba Julia (Ruman.) deziras korespondi per il. pk. kaj let. kun ĉiuj landoj. [1]

- La Katolika Grupo Esperantista en Düs-seldorf deziras korespondi kun katolikaj grupoj de la tuta mondo. Adr.: s-o Anton Loblächer, Düs-seldorf (Germ.) Hamm 126. [3]
- Subkolonelo de jugoslava armeo, St. Knežević, en Slav. Požega (Jugo-l.) deziras vigan korespondon per pk. kaj let. kun ge-Esperantistoj de la tuta mondo. [4]
- Mi deziras korespondi letere kun negermanaj samideanoj. — F-ino Grete Altendorf en Köln a. Rh. (Germ.) Friesenwall 58. II. [4]
- „Vendreda Klubo“ kunvenas en Köln, restoracio de „Schau-spielhaus“ ĉiun vendredon vespere je la 8-a kaj invitas je viziti ĉiujn samideanojn. Oni parolas nur Esperante. [4]
- Poŝtmarkojn el Fiume, Eplro, porcelan-monon, talerojn ktp. mi donas je modezaj prezoj. Akceptas abonojn por gazetoj „Tra la Literaturo“, „Sammlerwoch.“. Resendkosto. H. Schmidt en Breslau, Ahornallee 6 [2]
- S-o Penko Stoev, Banque nationale de Bulgarie en Plovdiv (Bulg.) korespondas kun bankoficistoj amerikaj kaj britaj pri bankaferoj. [1]
- H. Decuyper, Poethoffel 3, en Berchem Anvera (Belg.) serĉas korespondadon, sed nur kun japanoj. [1]
- F-ino Aina Ryyänen, Mallask. 14, as 4 en Viipuri (Finnl.) deziras interŝanĝi il. pk. kun ĉiulandaj geamideanoj [1]
- Filatelistoj kaj kolektistoj! Se vi deziras rusajn pm. aŭ papermonon sendu al mi esp. librojn, broŝurojn ktp. Mi havas amason da ĉiuspecaj rusaj pm. Laŭ deziro mi sendas ankaŭ rusajn gazetojn kaj ĵurnalojn. A Lebedev poŝt telegrafa kontoro en Tver (Rusl.). [1]
- S-o Sala Cesarino, poŝtoficisto en Mantovo (Italujo) deziras korespondi kun ĉiulandaj geamideanoj per il. pk. kaj fotografajoj. [1]
- S-o J. Meis, U'e Vöhma, Kokavere (Estl.) deziras korespondi kun ĉiuj landoj. [1]

- Alfred Bellem en Tallin, Lembitu t. 23-1 (Estl.) deziras korespondi per il. pk. pri popolivo kaj tipoj kun ĉiuj landoj. [1]
- Nagola Esperanta Studentaro. prez.: s-o Joŝi H. Išiguro, P. O. Box 46 en Nagola (Japanujo) petas alsendon de ĉiuj Esperantaĵoj por propagando kaj projekta ekspozicio. [1]
- S-o Paul Mänd, en Ambla (Estl.) kolektas diversajn vidindaĵojn por konatiigi lokajn ĝeneralecinojn kun eksterlando Ĉiuj pk. devas esti koloraj kaj tute puraj, t. e. neskribitaj. Akceptataj estas sendaĵoj (per rekomendita presajo) po 25 pk. Kontraŭsendota estas tuj 40 ŝtamp. pm. de Estonujo, Rusujo kaj aliaj kaj kelke da papermonoj eldonitaj de ĝeneralo Judent. Ne ŝanĝas pm. kaj papermonoj. Ne korespondas. [1]
- S-o Otto Dietrich en Fflrstenan Nr. 50. Post Lausenstein (Saksujo, Germani.) deziras interŝanĝi vidajkartojn, pm., fotografajojn kaj monerojn kun la tuta mondo. Mi petas leĝeban adreson. [4]
- Fraŭlo Josef Heis'er kaj fraŭlo Franz Hinterlandner en Traisen 125 (Aŭst.) deziras korespondi per il. pk. kaj let. kun ĝejnuloj el la tuta mondo. [1]
- S-o Jasaburo Cugada, advokato n-o 63, Kobataĉo, Sasebo, Nagasakiken (Kiuŝu, Japanujo) deziras korespondi pri kiu ajn temo. [1]
- Karaj geamideanoj! Tulkore mi dankas por viaj afablaj sendaĵoj. Ĉar mi ricevis 500 skribaĵojn, estis tute neeble al mi respondi ĉiujn. Kiu sendas al mi pm., gazetojn ktp., tuj ricevos respondon. Gerda Spiess en Danzig, Goldschmiedegasse 25. [1]
- Mi deziras sinceran kaj seriozan interŝanĝadon de pm. kun ĉiulandanoj. Ĉia kvanto estas bonvena; sendu unue (Mi estas kongresvizitonto). Fried. Hahn en Bremen, (Germ.) Riensbergstr. 22. [1]